

Krončjo La viruso

Viruso estas eta ne okulvidebla afero, kiu multobliĝas instaliĝante en la korpo de homoj.


Ĝi estas tiel eta, ke ĝin oni povas vidi nur per elektrona mikroskopo!
Imagu...



Kronôjo la viruso aperis unuafoje en Ĉinio, antaŭ la lasta kristnasko, kaj ĝi ne estas tre amuza.




Homoj, kiuj infektiĝas per tiu viruso estas lacaj, havas febron, tusadas kaj estas al ili malfacile spiri.





Tiu viruso transdoniĝas inter homoj, per proksima kontaktiĝo kun malsanulo aŭ lia salivo.

La respondeculoj en Ĉinio provis limigi la disvastiĝon de la viruso, sed cirkulado de homoj inter landoj ebligis al ĝi vojaĝi inter multaj el ili.




La landoj siavice starigas regulojn por malrapidigi disvastiĝadon de la viruso...



...kaj provas ellabori vakcinon, kiu povus baldaŭ protekti ĉiujn homojn...



Observante la regulojn de plenkreskuloj, vi helpas eviti, ke Kronĉjo kaj liaj fiaj amikoj multobliĝu plu. Estas ege grave, ĉar eĉ se plejparto de la homoj, kiuj infektiĝis resaniĝas senprobleme, aliaj homoj pli malfortaj povas travivaĉi akutajn sanproblemojn.



Kaj sekve, se tro da homoj malsaniĝas samtempe, kuracistoj kaj malsanulejoj havos tro da laboro!!



Vi certe nun komprenas, kial via lernejo estas fermita, kial vi ne plu povas fari viajn plej ŝatatajn aktivaĵojn kaj kial iuj gepatroj ne plu laboras...



...spertuloj opinias, ke evitante, ke homoj kontaktu samloke unu la aliajn, oni povos malpliigi la nombron de malsanuloj.



Nu, paciencu kaj ne maltrankviliĝu, dank' al ĉies klopodetoj kaj al malsanulprizorgantoj, ni baldaŭ malaperigos tiun viruson kaj ĝiajn fiamikojn for, kaj ĉio renormaliĝos.



: Paul de Lincen

: marquisdelivron

Traduko Fabien Tschudy